

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-  
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

FR. BARTH:

## HISTORIO KAJ ARKIVO DE ĈEĤOSLOVAKA INTERNACILINGVA MOVADO.

La tempo flugas kaj malrapide, sed sen-indulge eligas el niaj vicoj unu laboranton post la alia. Multaj el ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas ankoraŭ samtempuloj de la komencoj de esperanto, kelkaj eĉ de lingvo artefarita entute, precipe de la malsukcesinta „volapük“, kiu tiel malfaciligis la vojon de esperanto. Kun malperdo de tiuj personoj malaperos multaj dokumentoj pri la movado internacilingva ĝenerale kaj esperanta speciale. Sekve venas tempo por kolekti kaj skribi noti ĉion, kion oni ne trovas en la gazetoj kaj libroj, kio malaperus kun mortantoj, sed kion oni povas ankoraŭ trovi en rememoroj kaj skribaĵoj de vivantoj. Hodiaŭ ankoraŭ ni povas facile kolekti ĉiujn rememoraĵojn, leterojn, protokolojn, dekretojn, fotografiaĵojn ktp., kiuj dum la tempo malaperus kaj kies perdo estus neanstataŭigebla. Tiu ĉi laboro, malgraŭ nelonga daŭro de la movado, estas grandega kaj tial ĝi devos esti gvidata de la komenco laŭ sisteme.

Facile estas organizi la laboron ĉie, kie estas esperantistaj societoj. Inter la membroj certe oni trovos unu aŭ kelkajn personojn,

kiuj kolektos la materialojn, ĉu de la societo, ĉu de la membroj. Iom malfacile estos kolekti la materialon ĉe la izoluloj, kiuj pro diversaj kaŭzoj staras ekster la organizita movado, kaj tre malfacile estos serĉi la materialon ĉe multaj, kiuj en sia junaĝo estis aŭ samideanoj aŭ almenaŭ aprobantoj kaj helpantoj, kaj nun staras jam ekster niaj vicoj, kaj kiuj tamen posedas ofte gravajn dokumentojn kaj havas interesajn rememorojn. Persiste kaj sisteme oni devos labori por venki ĉiujn malfacilaĵojn, sed tiu ĉi laboro estos utila kaj necesa.

Fine oni devas havi centran organon, grupon da kapablaj laborantoj, kiuj kun kompreno kaj amo konservos kaj prilaboros la kolektitan materialon kaj priskribos la rezultatojn de farita serĉado. Jen estos bazo de la ĉeĥoslovaka esperantista arkivo kaj fonto de la skribita historio de la ĉeĥoslovaka esperantismo.

Kiel trovi la personojn, kiel kolekti la bezonajn financajn rimedojn? Pri tio eble oni povos fari enketon en „La Progreso“. Tiuj ĉi linioj celas ĝin iniciati.

JARMILA HAŠKOVÁ:

### SEVERA PATRO.

Ekstere kuŝis neĝo. Ĝi kovris la gruzo-amasetojn, glatigis la malglatan ŝoseon, alfroŝtis, malmoliĝis.

Jarda sidis en hejtigita ĉambro kaj estis referanta desegnaĵon.

Larmoj staris en liaj okuloj. Matene, ekvekiĝinte kaj ekvidinte, ke neĝas, li silente ellitiĝis por veki neniun, kaj surŝmiris siajn vintrajn botojn per graso. Tagmeze li mem alportis la glitveturilon el la kelo, skribis sian taskon kaj lernis. Sed la paĉjo... La paĉjo havas entute neniun komprenon. Ekstere estas neĝo kaj la paĉjo elpensas, ke li refaru la desegnaĵon. La paĉjo nenion malenvias al li. La paĉjo diras, ke eĉ sen glitveturado Jarda vivos. Li diras, ke li ankaŭ neniam glitveturadis. Jarda tamen ne estas kulpa pri tio. Se Jarda havus bubon, li mem farus al li la desegnaĵon, li helpus meti glitveturilon sur lian dorson kaj sendus la bubon en la straton. Kiel iu povas senigi knabon je tia plezurego!

Jarda enrigardiĝis al unu punkto. La mano kun cirkelo malleviĝis. Jarda imagis al si la glatan glitvojon. Li tiras la glitveturilon sur monteton. Liaj vangoj brulas, estas al li kiel en kuseneto, freŝa aero, kaj tiel bone li spiras. Rido, gaja kriado, ĝoja atmosfero, lanaj, diverskoloraj svetroj, ĉapoj, multekoloraj ŝaloj. Jarda vidas en pensoj, kiel sur la monteto li starigas sin en vicon, sidiĝas sur la glitveturilon, forpuŝas ĝin per piedoj, kliniĝas malantaŭen, sentas kiel plenforte kaj facile li veturas, la neĝo grincas, Jarda flugas kiel birdo, direktas, kriadas....

„Kien vi rigardas?“

Jarda ekskuiĝis. La paĉjo, altkreska, severa, senkompata. Lia rigardo nubigas.

Jarda timigite palpebrumas, lia gorĝo kuntiriĝis pro bedaŭro, la lipoj ekstremis. El la strato aŭdiĝis bruo de infanaj voĉoj, Jarda ne kuraĝis levi la kapon. La patro staris malantaŭ li kaj Jarda sentas sur si la esploran, severan rigardon....

La patro de Jarda observis la mienon de la filo. Li vidis, kiel la knabo perforte retenas la ploron, kiel li laboras kun malbone kaŝita malplaĉo.

Lia koro ekdoloris. Do lia infano, lia sango sidas ĉi tie en hejtigita ĉambro, komforte, ĉe lumo, havas trankvilon, havas helpilojn, havas neniun zorgon, havas nur sian studon — kaj sidas seninterese, senĝoje, ja eĉ naŭze.

Li ekrigardis malgaje la falantan neĝon.

Li rememoris. Li vidis sin iranta kun desegna tabulo en frostorigida mano. Frostas, neĝas. La fingroj bluiĝas, la piedoj frostas. En maldekstra boto li havas truon, kaj ne havas krejceron por pagi sur la ponto. Kvar krejcerojn li donis por desegnopapero. Nun li devas iri kvarfoje tra la ponto de Karolo por ŝpari la kvar krejcerojn. Je duonhoro pli longa vojo, kaj la desegnotabulo estas peza, la manoj frostas, la piedoj frostas, lia korpo tremas. Li malbone toleras malvarmon, ĉar hejme li neniam varmiĝas. Li lernas, laboras vualita en tablokovrilo, vestita en malnova mantelo de la panjo. La malvasta maniko malhelpas en laboro kaj la piedoj tamen frostas. Neĝas, li vadas tra neĝo, rapidas, timas, ke li ne venu malfrue en la lernejon, timas, ke la neĝo ne falu sur la desegnaĵon. Kaj ĝi tamen falis. La viro ĉe la fenestro rememoras, kiel li malfermis en la lernejo la desegno-kovrilon kaj kun teruro ekvidis, ke la verda koloro de la kovrilo foriĝis kaj du strietoj da verda koloro disfluis sur la preta desegnaĵo. Li vidas sin lavanta la desegnaĵon per spongo, timzorge kun espero, ke li riparos, kio difektiĝis, kun timo ke la profesoro ne diru al li: „Refaru tion...“

Ne temas al li pri la laboro, temas pri la kvar krejceroj. La gepatroj ne havas. Ne estas, de kie preni. Ili forŝiras al si de la buŝo, por povi doni al li krejceron por la ponto. Kaj li kuradas tra la ŝtona ponto por povi la krejcerojn de la buŝo forŝiritajn, eldoni por siaj lernejbazonoj. Li rememoras, vidas kiel proksimiĝas la profesoro, haltas kaj diras: „Tion vi jam ne riparos, refaru tion.“ „Sinjoro profesoro...“ li komencas timeme, sed la profesoro komprenas kaj ne komprenas lian mizeron. Glacie li daŭrigas: „Se vi ne havas monon, do ne studu...“

„Paĉjo.“

La petega voĉo de Jarda ekstremis tra la ĉambro. „Paĉjo, mi petas vin, venu kaj konsilu al mi.“ La patro alpaŝas al Jarda. La desegnaĵo estis malbona. Eble ĝi povis esti riparota, sed... Li prenas el la poŝo tranĉilon, distranĉas la desegnaĵon en la mezo kaj diras:

„Tion vi devas refari. Jen vi havas monon kaj aĉetu novan paperon.“

Jarda en mirego eksaltis de la seĝo, ekkriis kaj interplektis la manojn.

„Jesuo, Maria! Paĉjo, kion vi faris?“

Jarda ekploregis. Esktere neĝo falas, grincas sub la piedoj, la glitveturila vojo brilas — li devas sidi hejme, devas desegni.

La viro ĉe la fenestro rigardas la plorantan infanon. Jes, tio estas lia infano. Ĝi ploras kaj malesperas. Sed sidas en varmo, en hejma jako, en pantofloj, ĉe elektra lumo. Ĝi ne bezonas zorgi, de kie preni monon por papero.

„Do, ĉu ĝi fariĝos aŭ ne.“

Jarda senbrue leviĝis. Prenis la monon de sur la tablo, surmetis vintran superveston kun pelta kolumo, surmetis la ĉapon kaj malgaje eliris el la ĉambro . . . .

Lia infano! Ne frostotremas, lia eksteraĵo ne estas eluzita.

Sento de ĝoja kontentigo plenigis la bruston de la viro.

El la ĉeĥa trad: A. Grauerová.



J. S. MACHAR:

### ROMANCO EL LA TEMPO DE L' TRIDEKJARA MILITO

Sur herbejo oficiro — pensu nur! —  
volis al mi amon ĵuri por plezur'.

Deksesjara povis esti la fripon'  
kvin haretojn li jam havis sur menton'.

Mi ekmiris kaj tuj diris: „Ne sinjor',  
tie falĉas mia Joĉjo — iru for!“

Se li venus, li vin prenis sen kompat';  
Svedoj spertis, kiel gustas lia bat'!“

Nu, kaj kiam mi ekvokis: „Joĉjo, hej!“  
jam kuregis la sinjoro trans herbej'...

Tradukis Miloš Lukáš.



POPOLA KANTO:

### FLUAS AKVO KONTRAŬ AKVO...

(Teĉe voda proti vodě...)

Fluas akvo kontraŭ akvo  
forte blovas vento.

Elrigardas amatino  
el la subtegmento.

Ne rigardu el fenestro,  
sed prefere venu,

donu al mi unu kison  
kaj min ĉirkaŭprenu!

„Doni al vi unu kison?  
Kion dirus oni?“

Ne nur unu, karuleto,  
cent mi volas doni!“

Tradukis Miloš Lukáš.

DR. ST. KAMARYT:

### PACEDUKO KAJ INSTRUADO DE NATURSCIENCOJ

(Raporto prezentita en la Paceduka konferenco en Praha.)

Lernolibroj pri fiziko, kemio, zoologio, botaniko kaj mineralogio, kiaj estas uzataj precipe en la duagradaj lernejoj, ĝis nun neniel atentatas porpacan edukadon. Sed eĉ tiuj ĉi disciplinoj devas atenti tian edukon plej zorge. Ĉar se la maturiĝanta infano estas edukebla por paco, oni devas ĝin eduki per ĉiuj rimedoj. Nature, tiu edukebleco estas malcerta. Ni ja vidas daŭran alternadon de la teoriaro. La infanoj ne estimas la diojn de siaj gepatroj. Ondo liberalisma estas sekvata de ondo religiisma, racionalismon sekvas intuicismo, kaj tiel ĝis senfino. Sed ankaŭ la kredo pri edukebleco, perdidaktika estas tre fundamenta, ĉiam revenanta, kaj la plej grava argumento por rajtigiteco de la altruda lernejo. Metante do la edukeblecon al racionalisme pruvita idealo kiel fakton, ni trovas en aluditaj lernolibroj (kaj samtempe nature ankaŭ en la instruata materio) diversajn erarojn kontraŭ kaj diversajn helpilojn por la paceduko. Mi provis klasigi ilin jene:

1. Priskriboj de armiloj, balonoj, aeroplanoj, zepelinoj kaj aliaj militaj iloj kiel venenaj gasoj, telefonoj, telegrafoj, radio estas donataj tiel, kvazaŭ ilia milita celo, tio estas ilia teknika uzo kiel milita instrumento, estus la malĉefa, tute apuda parto de ilia uzado. Kvazaŭ oni fabrikadus sole negravan eron de la tuta fabrikaĵaro por la milita uzo. Tio ne respondas plene al la efektiva stato. La lernanto neniel ekscias pri la kvanto de varoj konsumitaj dum la paco por la milito. Tial oni devus kompletigi la instruadon per tion rilatantaj instruoj. Ekz. la eksplodiga materialo en granatoj post du jaroj fariĝas danĝera, ĉar la eksplodaĵoj estante maldaŭraj pro esenco de sia kemia konsisto transformiĝas tiom, ke oni devas dujarajn granatojn detrui, ĉar ili estus danĝeraj kaj nefidindaj samtempe. El tio sekvas daŭra bezono fabriki ĉiam novan pafan materialon. Tiu bezono havas du flankojn: a) eblecon laborigi la hejman industrion, afero dezirinda, b) neceson detrui sen ia celo tre komplikajn produktojn de la homa intelekto kaj laboro. Tiu ĉi malutilo estas pli granda ol utilo rezultanta el la industria laborebleco, ĉar ĉiam ekzistas bezono de varo alia, pli uzebla, kiun oni daŭre deziras. Oni facile komprenas, ke estas preskaŭ neeble tuj

haltigi la fabrikadon de eksplodaĵoj, la fabrikoj ne povas tuj preni alian fabrikadon, la komplikeco de la vivo estas tre videbla, sed same la lernantoj vidus la facilaniman kaj kontraŭracian malŝparemon, kiun pri homaj fabrikoj kaŭzas la nuna pormilita sistemo, eĉ dum la nuna paco.

2. Lernolibroj pri la priskribaj natursciencoj, precipe pri botaniko kaj speciale mineralogio donas, certe tre saĝe kaj praktike, specialan atenton al trovejoj en la propra lando. Tio estas senripoĉa sen ia ajn diskuto. Sed ofte tiu ĉi ĝusta tendenco kondukas al falsa imago, kvazaŭ la koncerna lando sufiĉus por si mem en pli granda grado, ol ĝi sufiĉas efektive. Tio estas grava eraro. La rezulta impresado de la lernanto devus esti tute kontraŭa. Oni devus montri, kiel kaj kiom dependas unu lando de la alia. Sed tiel false informas sian studentaron kaj sin mem nacioj grandaj kaj malgrandaj en la sama maniero. La malgrandaj volas al si montri ĉion, kio ĝenerale ekzistas sur ilia teritorio, la grandaj volas plidokumentigi sian ekonomian sendependecon. Ekz. laŭ ĉeĥoslovakaj lernolibroj pri mineralogio la lernanto pensus, ke en nia teritorio estas ankaŭ superfluo de fera minaĵo, ke ni produktas minaĵon kupran, plumban, stanan, kvankam ĉiujn ĉi krudaĵojn ni devas importi. Analogian ekzemplon mi povas noti el USA. Eminentaj lernolibroj pri kemio de sro H. S. Deming montras ĉe ĉiu elemento, kiel kaj en kiom sufiĉa eĉ supersufiĉa kvanto ĝi enestas en la tero de la grandega teritorio de Usonanoj. Sole la stano estas escepto. Sed la aŭtoro speciale atentigas la studenton, ke tiu ĉi manko ne gravas. „Usono, kiu kondukas la mondon en produktado de petrolo, karbo, fero, kupro, aluminio, arĝento, zinko, hidrargo plumbo, ne produktas stanon entute. Sed ĝi posedas aliajn metalojn, kiuj povas stanon anstataŭi en pli multaj okazoj. Se oni bezonus, nia konsumo de stano povus esti malgrandigita tre esence.“ La fieraj vortoj pri la stano estis skribitaj en 1924. En la jaro 1926 la prezoj de stano tiom suprensaltis, ke oni ŝerce nomis stanon metalo nobla. Neniel helpis al Usonanaj konsumantoj la lernolibra teorio pri anstataŭebleco de stano.

3. Informoj pri natursciencaj esploristoj trapenetas kiel rimarkoj ĉiujn lernolibrojn kaj certe ĉiuj instruantoj atentigas pri ili. Memkompreneble la informoj devas esti ĝustaj. Ne ĉiam estis tiel. Permesu citi ekzemplon timigan el lernolibro pri fiziko por la unua ŝtupo de dua-grada lernejo: „Descartes (1596—1650), filo-

zofa franca, estis soldato (batalis 1620 en Bilá Hora), sed forlasinte soldatan metion li okupis sin precipe per filozofio...“ (Petira-Brož, Fysika, 1912). Sed tiaj nekorektaĵoj malaperas daŭre. Sed kion oni ne faras ĝis nun kaj kio estas tre farinda, estas montri ĉe tiu okazo, ke la modernaj natursplorantoj estis aŭ novepokaj sanktuloj, kiuj forkuris en izolecon de la penso, aŭ organizantoj, kiuj marŝis sur pintoj de la ideoj kaj serĉadis transirejojn de unu al la alia; sed ke ili ne estis spiritoj, kiuj kreskis kaj fortiĝis el perforto.

4. La „beno de la militoj“ estas observo, kiu ŝajnas rezulti el disvolvo kaj evoluo de ĉiuj teknologioj. Kvazaŭ la militoj plirapidigus la kreskon de civilizo kaj kulturo laŭ diversaj flankoj. Kiel la plej konatajn ekz. el moderna epoko ni nomu: fabrikado de sodo laŭ Leblanca metodo kaj komencon de fabrikado de sukero el beto dum la napoleonaj militoj kiel sekvo de la „kontinenta blokado“. Pli bonigo de fabrikado de salpetro. Grandaj progresoj faritaj en aerveturado, fabrikado de nitrata acido el aero, de artefarita kaŭĉuko, dum la mondmilito. Estus nesage nei aŭ sekretigi tion al la studentoj. Sed oni montru la demandon, ĉu tiu ĉi plirapidigo ne estas sole ŝajna. Ekz. la sukerfabrikado el beto post la militoj ĉesis, la fabrikejoj bankrotiĝis kaj nur en jaroj ĉirkaŭ 1830 ekkomencis denove. Ankaŭ la rezultatoj de la industrio nitratacida kaj kaŭĉuka neniel estas post la granda milito tiom kontentigaj, kiom fanfaronis la militantaj generaloj de la centraj potencoj dum la blokado.

5. Speciala problemo estas en zoologio aŭ biologio, en instruado pri batalo por la vivo. Ĉi estas la teorio aŭ hipotezo, kiu kunigas tre diversajn faktojn, kunigas ilin tre utile kaj tre sprite. Sed ĝi povas esti neniel rigardata alie ol kiel natursciencia leĝo, tio signifas, ke ĝi neniel povas influ la moralon, esti bazo de ia normo etika. Simile neniuj povas bazi etikon ekz. sur la Newtona leĝo pri altiro de la materia maso aŭ sur la Richtera leĝo pri proporcia pezo de kemiaj elementoj entenataj en kombinaĵo.

---

*Raporto pri ĉiuj Paskaj aranĝoj en Praha aperos en la venonta numero.*

---

Dr. Jos. OGOUN, sekr. de la Konferenco:

### PACO PER LERNEJO.

La kompleta raporto pri tiu ĉi internacia konferenco, okazinta en Praha, la 16.-20. Aprilo 1927, aperos pli poste en speciala libreto. Tamen mi volonte plenumas la deziron de la redakcio de La Progreso kaj volas tie ĉi en konciza skizo prezenti, kio estis jam farita en la celado „Paco per Lernejo“ kaj plie, kio estas farota kaj kiel tion organizi, por ne labori kun perdo de energio. La konferenco montris, ke la afero ne estas ia senfrukta entuziasmaĵo de kelkaj revuloj, sed ke ĝi estas problemo, kiu jam nun estas enkondukata en la vivon, organike kaj celscie, de instruistaj organizaĵoj, nombrantaj ĝis 100.000 membrojn. Temas do pri celado kolektiva, naskiĝinta spontanee kaj samtempe ĉe multaj eŭropaj nacioj, el kiuj 16 reprezentigis en la Konferenco kaj tri sendis salutleterojn.

Estis 427 aliĝintoj, el ili 122 eksterlandanoj. Per ĝojiga impresio efikis la oficiala reprezentigo de nia respubliko. *Prezidento Masaryk*, akceptinte la protektoraton, vidigis kiel li taksas la paclaboron. La honoraj prezidantoj de la Konferenco, D-ro *Beneš*, ministro de l' Ekstero, kaj D-ro *Hodža*, ministro de l' Instruado, ambaŭ persone partoprenis la malfermon de la Konferenco kaj en siaj mallongaj paroladoj esprimis sian rilaton al la paca laboro: la unua, akcentinte la pacan tendencon de la ĉeĥoslovaka eksterlanda politiko, la dua, akcentinte ke la pacaj tendencoj de la ĉs. respubliko ne estus kompletaj, se ili ne estus subtenataj per la paca klopodado enlanda. Tiuj ĉi paroloj enhavis ion pli ol nuran ĝentilan respondon al la bonvenaj vortoj de la prezidanto de la konferenco. Kiu komprenis, tiu elsentis, ke ili ligiĝis al la paca tradicio de la ĉs. nacio kaj esprimis la pacan linion de ĉs. registaroj en la tempo estanta kaj estonta.

Koncerne la partoprenon el la Ĉeĥoslovaka Respubliko mem, ĝi estis tre efika ankaŭ laŭlabore: 8 ĉs. raportantoj troviĝis sur la programo, kaj krom tio en la formulado de la rezolucio efike partoprenis 5 ĉeĥaj kaj 4 germanaj raportantoj el nia respubliko. Estas ankaŭ necese atentigi pri la signifoplena fakto, ke la konferenco plene subtenis kaj praktike partoprenis ĉiuj ĉeĥaj kaj germanaj korporacioj de la instruistoj de ĉiuj lernej-kategorioj (popolaj, burĝaj, duagrada kaj altaj), korporacioj edukaj, etikaj, kulturaj — ĉeĥaj kaj germanaj. La kunlaborado de ĉi tiuj organizaĵoj estis spontanea kaj kora.

Kiam ni parolas pri la formala flanko de la konferenco, estas dezirinde aldoni ankaŭ kelkajn vortojn pri tio, *kiel sin montris esperanto* kiel oficiala lingvo. Ĝi estis unua provo farita pri esperanto en scienca konferenco en nia lando kaj certe ĝi vekos atenton de la scienca forumo enlanda kaj eksterlanda. Mi taksas tiun ĉi novaĵon objektivite kiel neesperantisto. Tamen mi devas diri, ke la spertoj de la Praha konferenco estas por esperanto favoraj. Estis eble rimarki, ke la plejmulto da partoprenantoj multe pli vive reagis je esperanto ol je naciaj lingvoj, kio precipe estis frapanta dum formalaj esprimoj (bonvenigo, sciigoj ktp.), je kiuj la aŭskultantoj potence reagis nur kiam estis tradukite esperante. La propono elekti esperanton kiel lingvon oficialan venis el Genevo, de Francoj, kiuj — kvankam ili bone scias fremdajn lingvojn, la anglan kaj la germanan — tamen elektis

esperanton, rezignante tiel memvole pri la sendisputa avantaĝo, kiun ili havas en internaciaj kunvenoj, kie oni parolas kaj debatas per ilia gepatra lingvo. Tiu ĉi ilia avantaĝo precipe vidiĝas dum diskutoj. Sed proponante esperanton, ili ĝuste intencis forigi unu el la psikologiaj malhelpoj de la internacia kunlaboro. Por ne tuŝi prestiĝon de iu ajn nacia lingvo, ili elektis lingvon neŭtralan. Elektinte esperanton, ili krom tio ebligis la partoprenon al vastaj rondoj de la instruistaro, precipe popolerneja, inter kiu esperanto estas pli konata ol la lingvoj franca aŭ angla.

Tiu aranĝo ebligis, ke la rezultato de la konferenco penetru pli funde inter tiujn, kiuj devas esti la praktikaj plenumantoj de la konferencaj decidoj. Ŝajnas, ke tiu ĉi supozo ne estis erara, kaj ke pli poste montriĝos ĝia praktika efiko.

En la daŭro de la konferenco esperanto tre bone manifestiĝis. La konferencanoj bone kaj facile interkompreniĝadis per ĝi. Tre interesa estis la publika kunveno, marde vespere la 19. Aprilo, dum kiu parolis dekkvino da delegitoj el la plej diversaj popoloj kaj vere, ilia elparolado estis mirinde egala. Grandan meriton pri la rapida kaj preciza interkompreniĝo havis la vicprezidanto de la Konferenco, D-ro Edm. Privat, tradukanto ege kompetenta, kiu glate kaj agrable tradukis el la angla kaj franca. El la germana tre bone tradukis red. Kreuz kaj D-ro Dietterle.

Kian atenton ĝuis la Konferenco, estas videble el la granda nombro da organizaĵoj aliĝintaj al la Prepara Komitato: Pedagogia Unuiĝo Komenský, Ĉs. Obec učitelská (Ĉs. ligo de la ĉs. ĝeinstruistaro), Svaz učitelstva ĉs. (Asocio de la ĉs. ĝeinstruistaro), Říšský svaz ĉs. učitelek (Tutŝtata asocio de instruistinoj), Ustřední spolek ĉs. profesorů (Centra Asocio de ĉs. profesoroj), Kruh přátel střední školy (Amikaro de la duagrada lernejo), Reichsverband deutscher Mittelschullehrer (Asocio de germanaj profesoroj en ĈSR), Verein deutscher Lehrerbildner in der Ĉs. Republik (Societo de germanaj edukistoj), Konfederace duševních pracovníků (Konfederacio de la intelektuloj), Obrodné hnutí ĉs. studentstva — etická skupina a středošolský odbor (Reforma etika movado de la ĉs. studentaro, etika grupo kaj fakto de duagrada lernejoj), Rusa pedagogia instituto, Ukraina pedagogia instituto, Deutscher pädagogischer Verein in Prag (Germana pedagogia societo en Praha), Ĉs. liga pro práva lidská (Ĉs. ligo por homaj rajtoj), Ĉs. liga pro mír a svobodu (Ĉeĥa ligo por paco kaj libereco), Deutsche Frauenliga für Frieden und Freiheit in ĈSR (Germana ligo por paco kaj libereco), Deutsche Gesellschaft für sittliche Erziehung (Germana societo por etika eduko), Paca societo Chelčický, Vysokoškolské sdružení pro Společnost národů (Grupo de altlernejoj por la Ligo de Nacioj), Ženská národní rada (Virina nacia konsilantaro), Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Ĉs. Instituto Esperantista.

La konferencon iniciatis Internacia Pedagogia Oficejo en Genevo, fondiĝinta en aprilo 1926. La Praha-konferenco estis ĝia unua internacia labor-kunsido. Elektro de Praha kiel konferenca urbo ne estis hazarda. Ĝi estis esprimo de fido al la pacifismo de la Ĉs. respubliko kaj esprimo de estimo al la glora tradicio de la grandaj pioniroj de la pacideo Komenský kaj Chelčický (elp. Helčicki). Samtempe ankaŭ praktika konsidero decidis.

Estis intenco, ke la konferenco ne estu pure

akademia, teoria diskuto de specialistoj, sed ke ĝi estu internacia forumo de tiuj, kiuj estos enkondukantoj de la ideoj en la praktikan vivon, do antaŭ ĉio de la instruistaro ĉiugrada. Estas certe merito de esperantistoj, ke sukcesis kunvenigi tiel grandan nombron da ĝeinstruistoj.

#### Reala profito de la Konferenco.

Profesoro *Bovet* prezentis psikologian analizon de l' infanaj instinktoj. Speciale li atentis la batalinstinkton; la pceduko celas direkti tiun ĉi instinkton sur la kampon de nobla morala konkurado.

Profesoro Dr. A. *Prescott* (Universitato Harvard en USA) montris, kiel en la praktiko oni mezuras la sentojn de l' infanoj per helpo de testoj. Tiuj ĉi eksperimentoj havas grandan signifon pro tio, ke la infanoj atentigas pri internaciaj rilatoj kaj rezonas pri ili.

Direktoro Rud. *Fridrich* (Brno) per tre interesaj eksperimentoj konstatis batalemon ĉe 46%, da infanoj, la pacemon ĉe 54%. Ĉiuj infanoj vidis kaŭzon de la militoj en motivoj ekonomiaj, neniu en diferencoj naciaj aŭ religiaj.

D-ro Stan. *Kamaryt* (Bratislava) montras, ke la principo „batalo por la vivo“ estas leĝo biologia, kiu ne povas esti bazo de iu normo etika.

*Du Pasquier*, kabinetĉefo en Saarbruck, rekomendas instrui en la lernejoj pri la Ligo de Nacioj.

*Fern. Maurette*, ĉefo de la Scienca Fako ĉe la Internacia Laboroficejo en Genève, pravas la principon: Se vi volas la pacon, kulturu la justecon!

Miloslav *Skočepa* (Německý Brod) akcentas la signifon de instruado pri la civitana etiko por la pceduko; li deziras 1) postuli ĉe la lernejoj administracioj de ĉiuj kulturŝtatoj, ke ili forigu la troan patriotismon en lernolibroj; 2) krei pedagogio-lernejajn „ataŝeojn“; 3) liberecon por la instruistaro de ĉiuj ŝtatoj diri la veron pri la milito; 4) la maksimuman subtenon de esperanto; 5) subtenon de internacia korespondado de la lernantoj kaj de ilia interŝanĝado.

S-ino Helena *Radlinská* (Warszawa) rekomendas interŝanĝadon de lernomaterialo, proponas entekori pri la uzado de tia materialo.

S-ro *Garnier*, inspektoro de duagrada instruado (Paris), kaj D-ro F. *Šmakal* (Ruĝa Kruco Praha), informas pri la vigla interlerneja korespondado nacilingva pere de Ruĝaj Krucoj. La Ĉeĥoslovaka peris dum 5 jaroj 1300 sendaĵojn al 30 landoj. Partoprenis 301 klasoj de 277 lernejoj.

W. *Hahn*, lernejestro (Dresden) raportas pri rimarkindaj sukcesoj de la infankorespondado en esperanto. En 68 urboj kaj vilaĝoj de Saksujo esperanto estas parte devige, parte fakultative instruata.

Jules *Prudhommeaux*, ĝen. sekr. de Franca asocio por la Ligo de Nacioj, raportis kiel la franca instruistaro agas kontraŭ lernolibroj milittendencaj. Nacia Franca Instruista Sindikato, havanta 80 000 membrojn bojkotas 26 lernolibrojn, kiuj ne respondas al la paca tendenco.

D-ro A. *Möbusz*, direktoro (Lübeck), atentigas pri la § 148 de la konstitucio de la Germana Respubliko, kiu ordonas, ke la instruado kaj la edukado okazu en la spirito de interpopola repaciĝo. an tiu spirito laboras Deutscher Lehrerverein kun pli ol 100.000 membroj.

D-ro J. E. *Williams* (Cardiff): Dum la lastaj kvin jaroj je la Tago de Bonvolo (18. Majo) la kimraj lernantoj dissendas radie saluton al la infanoj de la tuta mondo. Tiuj salutoj vekis ĉie

grandan eĥon.

Inspektoro Zd. *Franta* (Praha): La pacifismo ne estas sentimentala ĝemado kaj fermado de la okuloj antaŭ la realeco, sed sistema kaj peniga laboro kaj ĝi signifas ne nur militon kontraŭ la milito, sed ankaŭ kontraŭ ĉio, kio kondukas al la milito.

Disvastigi ĉi tiujn idealojn estas tasko de la lernejo, precipe de la instruado pri la historio, kaj estas unu el la taskoj de ĉi tiu kongreso varbi por tiu celo antaŭ ĉio la instruistaron.

Dr. P. *Dengler*, direktoro de Amerika Instituto en Wien, kreis ĉe sia Instituto grupojn de lernantoj, de gepatroj, de instruistoj. La kunlaborado kaj la reciproka fido estas senduba kaj tre fortigas la ideon de la universala paco. Nur unu problemato tamen leviĝas. Ne temas pri la gepatroj, nek pri la infanoj, sed pri la instruistoj. Ilia preparado devas esti aparte konsiderata kaj oni devas komenci tie, kie oni formas ilin: en la universitato.

Joh. *Storch*, direktoro de germana burĝa lernejo (Plzeň) rekomendas, ke estu verkitaj t. n. Mondlernolibroj pri tiaj lernobjektoj, kie ili estas eblaj, ekz. Mondlernolibro de la kultura historio, de Matematiko, de Etika Eduko; tiuj estu skribitaj en la paca spirito kaj enkondukitaj en la lernejoj de ĉiuj kulturŝtatoj. Plie li petas la Internacian Edukoficejon, ke ĝi dissendu esperantan alvokon al la nacioj, ke ĉiu el ili nomu 10-12 plej grandajn pionirojn de la progreso — virojn kaj virinojn — kies vivoprikskriboj estus akceptitaj por la Mondlernolibroj de la Etika Eduko; tiamaniere estus dokumentita la kunlaborado de ĉiuj popoloj en la komuna celado al la paco kaj estus forigata la erara tradicio de t. n. popoloj pli superaj, nobelaj.

Johannes *Barolin*, la konata pacifisto el Wien, vidas la plej efikan pacilon en la reciproka interŝanĝado de lernantoj, kiel ĝin jam longe praktikas Ĉeĥoj kaj Germanoj en ĈSR., aŭ Germanoj kaj Francoj en Svislando. Por ke tiu ĉi interŝanĝo povu okazi grandskale, estus dezirinde enkonduki unuecan lernejan organizon en la tuta mondo. Lia ideo estas, ke ĉie estu kreita kvarjara popola lernejo por la infanoj 6-10 jaraĵ, kvarjara mezlernejo, unua ŝtupo por la infanoj 10-14 jaraĵ, kvarjara mezlernejo, dua ŝtupo, (diversaj tipoj) por la infanoj 14-18 jaraĵ kaj kvarjara altlernejo (diverstipa) por 18-22 jaraĵoj. Al la unueca organizo ekstera apartenus unueca instrua plano, kompreneble kun konvena aranĝo laŭ la lokaj cirkonstancoj. Tiamaniere la lernantoj de diversaj nacioj povus partopreni certan tempon en fremdlandaj lernejoj, sen iu ĝeno al ilia normala evoluo.

El tiuj ĉi citaĵoj estas videble, ke tra la tuta Eŭropo estas sentata la neceso de unueca labororganizo, sed ankaŭ la neceso de unueca organizo de ideoj, eduko kaj moralo kaj ankaŭ la insista bezono de unueca internacia komprenilo.

Tr. R. H.

#### Fotografajoj de la konferenco:

- A) Konferencanoj sur la ŝtuparo.
- B) Konferenca Komitato (kun Prof. Bovet kaj Privat)
- C) Konferencanoj atente aŭskultantaj
- D) Tablo de la Estraro (kun ambaŭ ministroj)

Mendebla po 6:50 Kĉ (afrankite) ĉe La Progreso.

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

### Nova prezidento de ĈSR.

La 27an de majo 1927 Ĉeĥoslovaka parlamento (deputitoj kune kun senatanoj) trian fojon estis elektanta prezidenton de la respubliko kaj trian fojon ĝi estis elektinta prof. Tomáš Garrigue Masaryk (\*1850), kiu en konstitucia statuto de la respubliko (el la jaro 1920) estas proklamita la unua kaj dumvive reelektebla prezidento (la venontaj prezidentoj estas reelekteblaj la trian fojon nur post paso de sep jaroj depost la fino de sia dua prezidenta periodo.)

La nunjara elekto estas karakteriza pro kelkaj kaŭzoj:

Unue, Masaryk mem ne anoncis sin kandidato, sed estis kiel kandidato proklamita de politikaj partioj.

Due, li estis la sola kandidato, sen serioza kontraŭkandidato (la komunista kandidato, senatano Šturc, estis sole demonstra kandidato, kiu atingis 54 voĉojn el 432).

Trie, nunjare voĉdonis por Masaryk la unuan fojon ankaŭ Germanoj kaj Magiaroj.

Kvare, por Masaryk voĉdonis ne sole registaraj (burgaj), sed ankaŭ opoziciaj (socialistaj) partioj (274 voĉoj el 432).

Kvine, por Masaryk voĉdonis ne sole partioj aprobantaj liajn politikajn kaj socialajn ideojn (socialistoj), sed ankaŭ tiuj kontraŭstarantaj ilin (ĉeĥa popola partio = klerikaloj).

Sekve Masaryk estis elektita de partioj dekstraj kaj maldekstraj, ĉeĥoslovakaj kaj neĉeĥoslovakaj, amikaj kaj neamikaj, kiel sola ebla nova prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko por la venonta jarsepo.

La kontraŭuloj de Masaryk (krom komunistoj) ne nomis sian kontraŭkandidaton, sed voĉdonis per blankaj (sennomaj) biletoj (104 el 432); tiuj ĉi kontraŭaj voĉoj estis tiuj de ekstremaj nacionalistoj ĉeĥaj (naciaj demokratoj), slovakaj (popola partio = klerikaloj), germanaj (naciaj socialistoj = „hokkruculoj“) kaj magiaraj (kristanaj socialistoj).

La elekto farita de la ĉeĥoslovaka parlamento estis entuziasme aprobata de la popolo, kiu en Masaryk vidas la plej eminentan kaj meritplenan Ĉeĥoslovakon de la nuntempo, reprezentanton de la ĉeĥoslovakaj demokratiaj kaj humanecaj idealoj, liberiginton kaj renoviginton de la malnova ĉsl. ŝtato, fondinton

de la respubliko, gvidanton de la popolo eminentan viron de laboro, scienco, vero kaj paco.

Por la ekstero la tria reelektio (1918, 1920, 1927) de la sepdeksepjara Masaryk, ĉefo de la ĉeĥoslovaka kontraŭhabsburga revolucio dum la milito, estas pruvo ke la evoluo de Ĉeĥoslovaka respubliko progresas firme, normale, pace, senrompe, senbrue kaj senhaose, ke Ĉeĥoslovakio havas fortajn volon kaj kapablon esti fidinda helpanto de la paco en la centra Eŭropo. Tion garantias al la mondo la nomo de la prezidento Masaryk, kiu kun la ministro Beneš estas du solaj ŝtatoj en la mondo okupantaj sian altan postenon seninterrompe depost la monda milito ĝis nun kaj ankoraŭ plu. b ŝ k.

**Adam la kreinto**, nova fantazia komedio de fratoj Čapek, estis kun entuziasmo akceptita de la publiko en la Nacia teatro de Praha.

**Granda hotelo Nevada**, nova verko de ĉeĥa aŭtoro F. Langer, estis ludita kun konsiderinda sukceso en Warszawa. La teatraĵon tradukis la pola verkisto F. Gviždž.

**Ekspozicio de Ĉeĥa Libro** estis dum aprilo aranĝita en multaj urboj ĉeĥoslovakaj. La ekspozicio montranta la evoluon de ĉeĥa libro propagandis bonan ĉeĥan literaturon inter la popolo. Laŭ la granda vizito en ĉiuj lokoj estas atendebla bona rezulto.

**Monumento de Wilson** estos starigita en Praha antaŭ la stacidomo de Wilson en bela parko. La monumento estas verko de ĉeĥa-amerika skulptisto Polašek. La kostoj estos pagitaj de Ĉeĥoslovakioj vivantaj en Usono.

**Anglaj skoltoj el Leicestershire** elektis la urbon Praha kiel centron de sia nunjara libertempo dum aŭgusto. Sufiĉus ankoraŭ tempo, ke almenaŭ iu lernu esperanton, se ne estas inter ili jam esperantistoj. Tiel ili povos facile interkompreniĝi kun ĉeĥoslovakaj skoltoj. Angla lingvo ne estas multe konata en Ĉeĥoslovakio.

**Dua centmilo da radioamatoroj** en Ĉeĥoslovakio estis atingita en komencaj tagoj de aprilo laŭ sciigo de la disaŭdiga kompanio Radiojournal.

**Prezidento Masaryk**, nun 77 jara, faris vojaĝon tra Marseille al norda Afriko kaj Palestino kaj revene tra Athènes, kiu nomis lin sia honora civitano.

**Kanado, la ĉefa lando de ĉeĥoslovakaj elmigrantoj.** En februaro nunjara el ĉiuj 2418 ĉeĥoslovakaj pasportoj por transmaraj landoj estis destinitaj 1983 por elmigro al Kanado. Al Argentino vojaĝis 240, al Usono 171, al Brazilo 3 ĉeĥoslovakoj.

**Tradukoj el La Progreso.** Nia artikolo Festo de Sokoloj el n-ro 5.—6. 1926, tradukita finnlingven, aperis kun bildoj en la finna revuo Suomen Kuvalehti. Kiel ni jam anoncis (en la jara raporto de CAE), reprenis tiun artikolon la antverpena revuo De Turist en lingvo flandra.

**Z dila Otakara Březiny**, verko de Emanuel Lešehrad eldonita de Srđce Praha 1927, notas sub „Bibliografio“ ankaŭ la esperantan tradukon el Březina aperintan en „Bohemaj grenatoj“ de Stanislav Schulhof. G.

## REMORAĴOJ PRI LA UNUA TEMPO DE ESPERANTO

O. D. Ribaulb.

### III.

La tempo, kiam aperis „Esperanto“, estis plej feliĉa epoko de Volapük. Konsiderante ke en tiu tempo ekzistis dudeko da volapükistaj gazetoj, ke en iliaj kongresoj partoprenis po 100—200 aliĝintoj, ke ilia literaturo nombris apenaŭ 400 eldonaĵojn, enkalkulinte tie ankaŭ lernilojn, oni povus taksii tiaman nombron de volapükistoj je 2 aŭ 3 mil. Kaj tamen iliaj propagandiloj parolas pri milionoj . . . Similan trograndigon faris la apostoloj, laŭdante geniecon de Schleyer, lian scipovon de 67 (kaj poste 89) lingvoj! La pariza profesoro A. Kerckhoffs, la dua post sia majstro—specialisto pri V., tiel skribis en 1886: „Un polyglotte étranger, M. Schleyer de Constance, à la fois homme de lettres et linguiste distingué, est enfin parvenu, après vingt ans de laborieux efforts, à résoudre le difficile problème.“ (Fremda poligloto, S-ro Ŝlejer el Konstanco, samtempe literaturisto kaj distinginda lingvisto, fine sukcesis post dudek jaroj da laboremaj penoj solvi la malfacilan problemon.) Nu, Ŝlejer mem konfesis ke la ideo krei mondlingvon venis al li dum unu sendorma nokto en marto 1879; unu jaron poste, la lingvo jam estis finpreta! Ni devas vere miri pri la deklaro de Kerckhoffs, ke Volapük estis frukto de 20-jara laboro, kiam la aŭtoro mem konfesis, ke li tion faris dum 1 jaro. Alia ridinda deklaro de volapükistoj estis, ke ilia lingvo superas ĉiujn lingvojn de la mondo laŭ la riĉeco, beleco, esprimopovo. La apero de Esperanto estis forta bato por volapükistoj, kies parto tute seniluziigis pri la mondlingvo, alia parto restis fidela — obstine kaj konsternite, kaj tria parto forlasis la movadon por tuj aliĝi al la nova promesoplana junlingvo „Lingvo Internacia“ de Zamenhof.

Inter eks-volapükistoj kiuj iĝis fervoraj esperantistoj ni notu: Leopold Einstein, Auguste Demonget, E. de Wahl, W. Trompeter, Vladimir Ŝmurlo, Chr. Schmidt, Dro Mybs, A. Semizorov, Dro Lederer, John Ellis.

Ni povas taksii la morton de la volapüka movado proksimume en 1893, ĉar poste ĉesas la gazetoj, novaj eldonoj, kongresoj. Vere, grupeto da fideluloj restas, apud la majstro, kun la sola gazeto „Volapükabled Lezenodik“, kiu daŭris ĝis la morto de Ŝlejer, en 1912. Ni havas sub la mano lastan dikanan libron eldonitan en Volapük: „Grammatica Comparata del Volapük e Vocabolario Italiano-Volapük e Volapük-Italiano, di Maria Tommasi. Milano 1889-1890“. in-16° 1216 paĝoj. Sur la lasta kovrilo ni vidas blazonon de volapükistoj: ŝildo kun kvar partoj kiuj entenas literojn MBPB (Menadé bal püki

bal), sespintan stelon, kvinpintan floron, ankron; la ŝildo estas ĉirkaŭita de rubando kun la nomitaj kvar vortoj (kiuj signifas: „al unu homaro unu lingvon“). Super la rubandita ŝildo estas reĝa krono aŭreolita de hirundo portanta en la beko leteron. Sub la ŝildo estas du sinpremantaj manoj, kaj finsube la terglobo.

Sed tiu luksa kaj simbolabunda blazono ne povis revivigi la lingvon, kies sorto decidiĝis en la momento, kiam aperis nia lingvo; same ne povis savi Volapükon la luksaj libroj, lernolibroj en 89 (?) lingvoj, ktp. Estinta volapükisto, W. Rosenberger, la aŭtoro de „Reform-Neutral“ iufoje rakontis al la anoj de la petrograda societo „Kosmoglotto“ ke en la du unuaj volapükistaj kongresoj oni parolis nur germane, pro la malfacileco de la lingvo. Kaj kiam Rosenberger vizitis sian majstron en Konstanco, tiu ne volis respondi al li (R.) en volapüko, sed proponis: „Ni, plibone, parolu germane . . .“ Nun ni ridetante konsideras tiun lingvon, kiu estis iam la konkuranto por la nia. Sed en la unuaj du tri jaroj niaj pioniroj serioze timis Volapükon, tro imagis ĝian forton, troprenadis ĝin kontraŭbatali. Kiel unu el la pruvoj pri tiu timo kaj malamikeco al Volapük restas serio da artikoloj kiujn verkis Zamenhof en la unua gazeto „La esperantisto“ 1889-90. Ni vere nun miras kiom da ironio, mokeno, kontraŭargumentado, eĉ da maljusta traktado elspezis tiam juna aŭtoro de nia lingvo; tiu artikolo pruvas ankaŭ, ke ne ĉiam Zamenhof estis trankvila, sindetena, tolerema, kiel lin prezentas al si la nova generacio da esperantistoj. Cetere, li ja mem skribis en sia unua libreto (1887): Ho, mia kor', ne batu maltrankvile . . .“ kaj la konata trankvila ekstero, kiun konas ĉiu vidinto la majstron, ordinare kaŝis internan emociadon, suferon aŭ malgajon.

(Daŭrigota.)

La senpacience atendata helpilo

## BES-ADRESARO

### de esperantistoj el ĉiuj landoj

kun 500 adresoj el 30 landoj kaj 3 poŝtkartoj  
kun portretoj de esperantistoj

ĵus aperis.

Ricevebla por 5 Kĉ (fremdlande 0.50 Fsv.) en ĉiuj  
librejoj de Ĉsl., ĉe „La Progreso“ aŭ rekte en la  
eldonejo

BOHEMA ESPERANTO-SERVO  
MORAVANY V Č.



FR. BARTH:

## FONDO DE „ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA“.

*Al la historio de la internacia lingvo en Ĉeĥoslovakio.*

La jaroj pasas. Pasos jam dudek kvin jaroj de la tempo, kiam ni fondis „Esperantistan klubon en Praha“. La samtempuloj malrapide foriras. Certe estus dezirinde ĝustatempe kolekti ĉiujn informojn pri la komencoj de la movado ĉe ni. Nun ankoraŭ oni povas kolekti multajn rememorojn de la partoprenintoj kaj multajn skribajn dokumentojn — ambaŭ fontoj, personoj kaj dokumentoj, estos senĉese pli kaj pli maloftaj.

Mi volas provi priskribi la historion pri la fondo de la klubo en Praha.

En la fino de la jaro 1901 aperis en „Sběratel dopisnic“ (Kolektanto de poŝtkartoj), redaktita de S-ro Jirků, tiame funkciulo (komitatano aŭ oficisto) de Komerca muzeo en Praha, se mi ne eraras, malgranda notizo malpli ol kvarlinia pri la internacia lingvo esperanto. Por doni pli detalajn informojn proponis sin S-ro Theodor Čejka, instruisto en Bystřice pod Hostýnem (Moravio). Mi do demandis kaj efektive ricevis pakajon da diversaj materialoj prezentantaj imagon pri esperanto kaj kune la statuto de První rakouský klub esperantistů v Brně“ (La unua klubo de aŭstriaĵ esperantistoj en Brno, Moravio; prezidanto † redaktoro K. Pelant, sekretario J. Kajš).

Lerninte esperanton mi nature komencis serĉi aliajn partianojn en Praha. Mi petis la klubon en Brno sciigi al mi la adresojn de esperantistoj el Praha; oni rekomendis al mi serĉi ilin en la adresaro de Zamenhof, eliranta tiame kiel malgranda kajereto unufoje dum la jaro. En la jarkolekto 1902 mi trovis krom mia adreso ankoraŭ dek aliajn de Praha. Mi trovis, ke ok el tiuj enskribitoj dume jam perdis la intereson pri la afero aŭ ŝanĝis loĝejon, ke ili transloĝiĝis, „oni ne scias, kien“.

Mi rimarkis, ke oni devas fari propagandon de unu persono al la alia. Sed tio estis afero tre malfacila. Kiu travivis la komencojn de esperanto ĉe ni, certe memoras la parolaĉojn ĉe sola aludo pri esperanto. Estis al mi klare, ke la unuopulo sen libera tempo kaj sen financaj rimedoj malmulte atingos kaj inter miaj konatoj ne estis personoj tiel feliĉaj por esti riĉaj je aluditaj kvalitoj. Tial ni decidis kolekti la fortojn, fondi societon.

Belega, senzorga entreprenemo de la jun-aĝo! Al ni ŝajnis nenio pli facila ol fondi la societon, al kiu aliĝos centoj da membroj, kiu fariĝos finance potenca kaj entreprenos energian propagandon por la afero, kiu fariĝis al al ni kara.

Iam en duono de februaro 1902 aperis en tiama ĵurnalo „Pražský denník“ (antaŭulo de la nuna „Československá republika“) — malkara, ne tro legata registara ĉiutaga gazeto — propaganda artikolo pri esperanto subskribita „Fix“. Jen, subite aperis neatendita kunlaboranto kaj eĉ ĵurnalisto. Ĉe la vizito mi trovis, ke sub la pseŭdonimo „Fix“ estas kaŝita la redaktoro mem de la ĵurnalo S-ro Xaver Menhard, kiu tuj kompleze promesis aperigadi pluajn artikolojn, se mi transprenos la devon respondi eventualajn petojn pri informoj.

Miaj esperoj kreskis. Sed anstataŭ atenda amaso da interesantoj aperis sole kelkaj (se mi ne eraras, tri) demandintoj. Tamen tio estis sukceso, pro kiu ni estis neordinare fieraj kaj kun plezurego ni daŭrigis nian laboron.

Ni volis fondi en Praha filion, grupon de la klubo en Brno kaj tiu ĉi komence estis inklina fari tion, sed baldaŭ i konsilis fondi memstaran klubon.

Fondi klubon signifis posedi almenaŭ tiom da membroj por sufiĉi krei komitaton. Afero malfacila, kie preni membrojn? Sed tiame estis ora epoko de esperanto; ĉiu samideano estis ankaŭ klubano. Do fari samideanojn!

La laboro ne estis tiel facila, kiel ŝajnas al ni hodiaŭ. La cirkonstancoj antaŭ dudek kvin jaroj estis iom aliaj kaj eĉ la vorto „internacia“ estis tiam nebone sonanta. Krom tio la propagando estis farata sole de „ni junuloj“ sen spertoj, sen mono, sen tempo, ĉar ni preskaŭ ĉiuj staris en la komenco de nia kariero.

Mi ne scias, kiel longe ni starus en la komencoj, se ne estus S-ro red. Fix-Menhard, kiu persiste aperigadis notizojn pri esperanto en „Pražský denník“. Danke tiun ĉi cirkonstancon, tamen kolektiĝis kelkaj scivolemuloj, el kiuj la plejmulto direkte demandis pri la venonta klubo.

La propaganda agado de Menhard altiris neatendite alian ageman laboranton, teatron raportiston S-ron Kriegerstein-Vojnar, spertulon en societo, bonegan paroliston kaj fervoran societgvidanton — li plej energie instigis ia fondon de la klubo. Li fervore pro-

pagandis esperanton en tre vastaj rondoj de siaj personaj konatoj kaj en ankoraŭ pli vastaj rondoj de legantoj de sia semajna gazeto „Nájemník“ (La luanto), multe serĉata pro sia teatra rubriko. En la gazeto li kompleze malfermis rubrikon por esperanto; li eĉ dediĉis duonon aŭ unu kolonon semajne por la gramatiko kaj ekzercaro; per tiu ĉi rubriko oni gajnis novajn partianojn kaj — ĉefe — oni konatiĝis kun malnovaj samideanoj.

Hodiaŭ eble multaj ridas kaj miras, ke ĝuste „Pražský denník“ kaj „Nájemník“ estis niaj organoj kaj perantoj. Kial ne la grandaj kaj ŝatataj ĵurnaloj? Tute simple pro tio, ke la plejmulto el granda vico da ĉeĥaj ĵurnaloj etadis la notizojn pri esperanto en korbojn kaj la petojn pri publikigo de artikoloj eĉ ne respondadis. Kaj kiu respondis, tiu sciis trafi. Ekzemple la redakcio de „Právo lidu“ (Rajto de la popolo; ĉefurnalo de la ĉeĥa sociala demokratio) mian peton publikigi deklinian (!) notizon respondis (3. IV. 1902) tiel:

Nemáme času ani chuti fedrovat Esperanto. Jestli tak činí p. Pelant v Brně, je to jeho věcí a nemá pro nás žádného významu. Pokud se týká nějakého insertu, je věcí naší administrace, na níž se rače obrátiti.  
Ant. Němec, redaktor.

Ni havas nek tempon nek volemon propagandi esperanton. Se tion faras s-o Pelant en Brno, tio estas lia afero, por ni sensignifa. Koncerne iun anoncon volu turni vin al nia administracio, ĝi estas ĝia afero.  
Ant. Němec, redaktor.

Tiame estis aranĝata en Praha „La unua laborista ekspozicio“, la unua ĉe ni kaj eble la unua sur la mondo. Ŝajnus nenio pli facila ol propagando de la lingvo internacia sub la devizo „La proletarioj de la tuta mondo unuigu!“ Se ni nenie trovis la komprenon, certe ni trovos ĝin tie ĉi. Sekve ni skribis al la ekspozicia komitato petinte permeson elmeti afiŝojn, meti atentigon en katalogon kaj fari diversajn paŝojn, kiuj hodiaŭ ŝajnas al ni tute naturaj. Sed, kiel ni eraris. Venis al mi respondo:

Vážený pane! K vašemu dopisu ze dne 17. V. sdělujeme s vámi, že bylo ve výboru „I. dělnické výstavy v Praze“ ustanoveno, aby z Vámi zamýšlených plakátů vyžádan byl poplatek jedné koruny za kus.

Doufáme, že při této nízké ceně na poplatek přistoupíte.  
Ant. Reis, místopředs.,  
K. Beránek, jednatel.

Estimata sinjoro! Al via letero el 17. V. ni sciigas al vi, ke la komitato de la „I. laborista ekspozicio en Praha“ decidis postuli la pagon de unu krono por ĉiu de vi intencata afiŝo.

Ni esperas, ke la pagon de tiel malalta prezo vi akceptos.

Ant. Reis, vicprezidanto  
K. Beránek, sekretario,

La originalojn de tiuj ĉi kaj de aliaj le-

teroj mi havas konservitaj por ebla venonta arkivo pri internacia lingvo ĉe ni (vidu specialan artikolon pri ĝi en tiu ĉi gazeto).

En la jaro 1902 la pago unu krono sole por loko estis tre granda, speciale por homo kun monata salajro dudek kvin guldenoj kaj paganta sola ĉiujn poŝtajn elspezojn senĉese kreskantajn.

Sed ĉio ĉi ne prenis al ni la volon por pluaj entreprenoj, kiuj ĉiam finiĝis kun malsukcesoj, pro kiuj ni miris ja, sed kiujn ni tamen preterpasis irante pluen. Nia tuta penado celis interesigi por la ideo iun eminentulon; ni faris provon jen tie jen aliloke — ĉiam sensukcese. Hodiaŭ ni alimaniere rigardas tiamaĵn malsukcesojn kaj eĉ komprenas, ke ne povis esti alimaniere.

Nur hodiaŭ ni ankaŭ vidas, kiel grandega estis laboro kaj kiel valorega estis helpo de sinjoro Theodor Cejka el Bystřice pod Hostýnem, riĉe kaj malavare subtenanta nin per la plej diversaj presaoj, kiujn eldonadi ni mem kun niaj rimedoj ne povis kuraĝi eĉ pensi.

Nia sola sukceso estis artikoloj en „Pražský denník“ kaj la rubriko en „Nájemník“. Eble iu demandos, ĉu havis sencon propagandi esperanton inter legantoj de „Pražský denník“, al kiuj nenio estis pli malproksima ol la ideo pri la internacia lingvo. Vere la nombro da demandintoj ne estis granda, tamen ni ĝojis eĉ pro la malmulto. Pli oni povis atendi de la legantoj de „Nájemník“ multe disvastigita en tiu tempo pro siaj teatraj kritikoj. Estas juste konstati, ke ambaŭ gazetoj faris, kion ili povis. La estonto tion taksos, ĉar tiame grandaj kaj provincaj ĵurnaloj estis aŭ malamikaj aŭ indiferentaj. Per tiuj gazetoj malrapide kuniĝadis adresoj de interesantoj, kaj ni povis inviti ilin por kunveni.

Ni kunvokis la unuan kunvenon de la amikoj de lingvo esperanto al la 20 de junio 1902 en la restoracion en „Konvik“ (Bartolomějská). La programo de la kunveno estis lego kaj prezento de la statuto de la proponata klubo. La redakto de la statuto ne postulis tro da laboro, ĝi estis farita laŭ kutimaj modeloj.

Ni invitis ĉirkaŭe kvindek personojn, sed en „Konvik“ venis proksimume dek personoj (unu sinjorino), nombro neatendata de ni post ambaŭ spertoj. La statuto estis prezentita por oficiala aprobo kaj oni povis komenci societatan agadon. Sed rigardante la someran sezonon ni decidis kunvoki la ĝeneralan fondan (konstitucian) kunvenon nur en la aŭ-

tuno esperante, ke ni ankoraŭ sukcesos gajni novajn partianojn. La intereson ni vidis laŭ tio, ke la librejo de E. Weinfurter (Vodičkova, Praha II.) vendis en Praha proksimume 300 ekzemplerojn de la lernolibro de Ĉejka. Estas sendube, se la ĵurnaloj estus akceptintaj niajn notizojn, la intereso povis esti pli granda.

La preparadojn por fonda kunveno ni kompreneble faris laŭ modesto de niaj financaj rimedoj. Ni dissendis grandan amason da invitoj al individuoj kaj korporacioj, ĉe kiuj ni supozis almenaŭ iometan eblon de la intereso pri la afero, ni bombardis la redakciojn, kaj ni esperis, ke la kunveno estos imponanta. Iu el ni, mi ne memoras kiu, faris belajn afiŝojn por montraĵ fenestroj de komercejoj, kaj ni faris rondan vojaĝon tra komercejoj de ĉefaj stratoj. La rezultato estis, ke ĉie oni rifuzis la afiŝojn, kvankam ili estis vere belaj, kaj ni petis pendigi ilin por solaj tri tagoj.

Sole librejoj de Topič kaj Weinfurter kaj unu alia komercejo sur la tiama strato Ferdinandova (nuna Národní) permesis al ni meti nian afiŝon en ilian montran fenestron.

Plua zorgo estis trovi konvenan ĉambro. La ĉambro en Konvikt, kie ni aranĝis la preparon kunvenon, ŝajnis al ni malgranda, tiu sur la insulo Žofín (Slovanský ostrov) tro multekosta — kaj la nombro da aliaj disponeblaj estis tiame tre malgranda. Fine ni konsentis lui ĉambregon de restoracio „U Štajgrů“ (kie hodiaŭ estas komerca domo de Novák en Vodičkova, Praha II.), kiu sufiĉis por 300—500 personoj.

Fine la 9. de Novembro 1902 venis tago de la memorinda fonda kunveno de „Esperantista klubo en Praha“. En la granda ĉambrego regis malpleno kaj mallumo, la publiko estis kunvenanta tiel, ke ĉe la komenco prokrastita je unu horo ni kalkulis dek kvin ĉeestantojn, el kiuj du aŭ tri estis nekonataj al ni; la ceteraj 12—13 estis ni, „malnova anaro“. Tiu ĉi malĝoja komenco nature ne povis entuziasmigi nin kaj tial ni senceremonie elektis la unuajn prezidanton kaj komitaton. La unua prezidanto fariĝis S-ro E. Weinfurter, librovendisto (Vodičkova, Praha II.). La elektita komitato tuj kunvenis kaj konstituiĝis jene: viceprezidanto S-ro Fr. Kühnl, sekretario S-ro Fr. Barth, kasisto S-ro J. Görner, protokolisto S-ro Ed. Kühnl, inventariisto S-ro S. K. Neumann, bibliotekisto S-ro F. Vaníček, anstataŭanto F-ino Heintalová. Kiel kunvenejo estis elektita la kafejo „Union“ (en la strato tiame Ferdinandova, nun Národní).

Tiel estis fondita „Esperantista klubo en Praha“. La priskribo de ĝia plua historio ne apartenas en la kadron de tiuj ĉi rememoroj. Ĝi aperos aparte.



#### EL LA LETEROJ RICEVATAJ

**Kiel ni prononcas.** S-ro L. Krysta el Ĉes. Těšín sendis al ni leteron, el kiu, pro ĝia longeco, ni citas la ĉefajn pensojn: „Dum Bratislava kongreso mi parolis kun pli ol cent kongresanoj, ĉeĥoj, slovakoj, germanoj kaj hungaroj; sed eĉ ne dek el ili prononcis bone. Ĉeĥoj kaj slovakoj emas akcenti la unuan silabon. Jen unu aŭdita frazo: *Hodiaŭ ni pritraktis tre gravan aferon.* Rimedo kontraŭ malbona akcentado estas tre simpla: Ĉiu Esperantisto elserĉu el sia provizo ian Esp. legafon, kiun li havas duoble, elserĉu en ĝi ĉiujn tri- kaj plisilabajn vortojn, substreku la antaŭlastan vokalon en ili, sed nur en unu ekzemplero; tralegu kelkfoje ĉi tiun tekston, bone akcentante; invitu poste sian Esp. amikon aŭ amikinojn kaj igu ŝin aŭ lin legi la neakcentitan tekston, mem bone kontrolante la korektan akcentadon. — Venontfoje la nun invitita persono procedu reciproke, rolante la kontrolanton. Faru tion ĉiu! Se vi, karaj gesamideanoj, ekzakte kaj ofte plenumos tiun procedon, speciale notante la malbone akcentitajn vortojn, vi baldaŭ povos konstati, kia estas via akcentado. Mi ripetas: faru tion ĉiu!

**Lernu paroli.** Niaj ŝatataj esperantistoj en siaj kunvenoj plej fervore kaj vigle babilas — ĉeĥe. Ĉu pro tio ni vizitadas esp. kunvenojn, ke ni tie ĉeĥe amuziĝu? Por tiu celo taŭgas ja kiu ajn kafejo, kie oni povas eksidi kiam ajn. La senco kaj celo de nia kunvenado estas ja la ekzercado kaj perfektigado en la lingvo, por kio ni havas okazon nur dum la klubaj kunvenoj, do unufoje por du aŭ tri horoj semajne, ie eble eĉ malpli ofte! Ĉe tiaj cirkonstancoj estas do la koncerna peno de l' zorgemaj prezidantoj tute prava kaj estus dizirinde, ke ili trovu la vere sukcesan kaj plej taŭgan paroligilon. Tamen pri tio mi dubas, ĉar kiel ajn sprita sistemo neniel helpos, se niaj ŝatataj gesamideanoj mem ne volos kaj ne klopodos ellerni la lingvon perfekte. Niaj karaj gefratoj estas tro kontentigemaj. Sufiĉas al ili, se ili scias per simplaj vortoj esprimi la ĉiutagajn frazojn (ofte eĉ tiujn ne ĝuste) kaj tial opinias, absolvinte la kurson, sian lernadon finita. Ili ne penas per legado kaj interparolo kompletigi siajn sciojn kaj iom post iom eĉ forgesas kion ili ellernis. Se agus tiel nur oportunaj maljunuloj, ĝi estus ankoraŭ pardonebla, sed vidi junajn, viglajn fraŭlinojn kaj sinjorojn, kiel ili post kelkara vizitado de la klubo ĉiam pli balbutas, estas dolora, kaj la fido je ia paroligilo kaj eltrovado de ĝi, hontinda konfeso de ilia propra senpoveco. Se oni vere volas perfektigi, oni ne bezonas iajn „paroligilojn“. Sciante, ke kiel la naĝadon oni ne ellernos nur el la libro, sed devas ekzerci ĝin en la akvo, same la lingvon oni perfekte ekregos nur per la praktika uzado kaj atenta legado, oni mem uzados ĉiun okazon por praktiki ĝin. Ke oni havas sufiĉe por diri al si, tion pravas ja la vigla amuziĝo ĉeĥlingva, do se oni penas ĉion, kion oni dirus ĉeĥe, esprimi ankaŭ esperante, oni havas sufiĉan okazon por perfektigadi. La komencaj malfacilaĵoj ne devas timigi. Estas ja memkompreneble, ke oni

ne parolos tuj flue kiel sian gepatran lingvon, sed ne cedante de la vojo ekirita, oni baldaŭ atingos eĉ tian fluecon. Nur ne cedi, elteni kaj la venko super niaj propraj paroliloj estas nia. Eĉ estante solaj oni povas praktiki tiun ĉi metodon, penante pensi esperante, paroli esperante kun si mem, spirite. Kaj tio estas la plej sukcesa vojo al la venko. Se aperas io, kio ŝajnas al vi ne esprimebla esperante, meditu pri ĝi kaj vi trovos solvon tiel simplan, ke vi ekmiros. Se vi tamen ne trovos ĝin, bone, ĵeri estas io por la kunveno, kio povas vekigi vigran kaj interesan diskuton. En la kunvenoj korektu reciproke la erarojn unu al la alia. Pensi estas pli facile ol paroli, kaj tial ĉiam la aŭskultanto pli frue rimarkas la eraron ol la parolanto; neniuj ofendiĝu pro tia korektado, ĉar neniuj estas senerara. Nur tiam, se niaj samideanoj ĉiuj ankaŭ bone scias la lingvon, ni povas paroli pri la „forta movado“ ĉe ni, sed la entuziasma vokado „vivu, kresku kaj floru nia bela esperanto“ ĉe la fino de la paroloj plenaj de eraroj, diritaj kun oreltiranta akcento, sonas kvazaŭ ironia mokaĉo de l' murdiganto de l' esperanto. *B. Vlček.*

## LINGVA FAKO

### Z ESPERANTSKÉ FRAZELOGIE.

#### A. Příkladý pro překlad (3).

40. Ne ploru, sed agi. Mapli da vortoj, pli da agoj. — Fari tablon. Fari versojn. Fari miraklojn. Dio faris la mondon el nenio. Fariĝi maljuna. Fariĝi Esperantisto. Juĝu laŭ faroj, ne laŭ vortoj. Bonfaro. Bonfaranto — La knabino konduktis neriproĉinde, dum la tuta servado. Konduco. Bonkonduco. — Hirurgia procedo. Procedi. — Manipuli = procedi per la manoj, farante ion, uzante instrumenton.

41. Borsa agento. — Faktor = mal-supera makleris'o.

42. Agiti antaŭ elekto. Agito. Agitanto — Propagando de abstinenco. Propagandi esperanton. Propagandisto. — Protagonisto = unua, ĉefa batalanto por nova ideo. — Pioniro = homo, liberiganta la vojon por nova ideo; = soldato, konstruanta vojojn, pontojn, redutojn; = koloniano, hakanta virgajn arbarojn, por prepari kultureblan teron.

43. „La nigra aglo“ = la aglo de la prusaj standardoj. „Li ne estas aglo“ = li ne estas persono de alta inteligenteco. Agla nazo = nazo kurbigita, kiel la beko de la aglo.

44. Aglutini la randojn de vundo. Aglutini leukocitojn.

45. Agrabla persono, vizaĝo, voĉo. Malgrabla.

46. Agraf = metala hoketo kun ringeto, kiu servas por kunigi du randojn de vesto. Agrafi. — La broĉo estas juvelo, portata de virinoj. — Buko de zono. Buki zonan. — Pinglo. Duobla pinglo. Amerika aŭ sendanĝera pinglo. —

47. Agregato de molekuloj.

48. Kian ĝon li havas? Li estas kvardekjara. Li estas pli aĝa, ol lia fratino. En tre multaj landoj oni fariĝas plenaĝa post la dudekunna jaro de de la vivo.

49. La aliĝo de famaj scienculoj forte akcelis la progreson de Esperanto. Akcelo.

50. La Francoj, parolante esperante, ofte metas la akcenton sur la lasta silabo. Akcenti.

51. Ne estas ĝentile ne akcepti donacon. S<sup>mo</sup> N. (No) akceptas ĉiun mardon. La propono estis akceptita per aklamon. Akcepto. Akceptebla. Neakceptebla propono. — Ricevi monon de patro. Ricevi leteron de amiko. Sciigu al mi la ricevon de mia sendaĵo. — Preni pecon per du fingroj. Preni knabon je la mano. Preni sieĝatan urbon. Preni banon. Ĉirkaŭpreni. Depreni kovrilon. Forpreni. Kunpreni pluvombrelon. Partopreni. — Rifuzi al iu. Rifuzi al peto. Rifuzi fari. Rifuzo.

52. La kurso de la akcioj falas dum milito. Oni aranĝas ĉiujare kunvenon de la akciuoj por decidi la plej gravajn aferojn de la kompanio. — Akcizo = imposto de la manĝaĵoj, alkoholaĵoj k. t. p. (= kaj tiel plu).

53. Fervoja akcidento. Laboristo, vundita de akcidento. — Okcidenta vento. Okcidenta lando.

54. Eksterminte la malamikojn la taĉmento revenis kun riĉa akiro. — Gajni en kartludo, en loterio. Gajni la batalon. Malgajni veton. — La kompanio havis cent mil frankojn da profito. La penado donis nenian profiton. Profiti la lecionojn de la historio. Profitema. — Utili instruon. Ĉiuj komprenas la utilecon de la lingvo internacia, sed ne ĉiuj kredas je ĝia ebleco. Senĉesaj adminoj tute ne utilas. Malutila konsilo. Malutilo. Senutilo.

55. Mi akompanos vin al la stacidomo. Akompananto.

56. Akordo de la adjektivo kun substantivo. Akordigi. La predikato akordiĝas kun la subjekto. Akordigebla. — Agordi = konformigi reciproke la kordojn de instrumento, unu instrumento al alia. Agordo. — Muzika harmonio. Harmonio de la universo. En nia societo regas plena harmonio. Harmonie. — Stilo konforma al la temo. Konformigi — Konfirmi la novaĵon. Soleno de la konfirmo. Konfirmoto.

57. Akra tranĉilo, glavo, tondilo. Akra rando. Akra manĝaĵo, malvarmo, koloro, sono, voĉo, odoro. Akraj vortoj. Akreco. Akrigi tranĉilon. Akrigilo. — Akuta kataro. — Piki fingron per kudrilo. La abelo pikas. Pikanta manĝo. Pikanta novelo de Boccaccio. Pikilo.

58. Akso de la tera globo, de rado. Akso de floro, de vojo.

#### PŘEKLAD PŘÍKLADU.

(Poznámk a.)

Zahajuje frazeologický výbor z „Vortaro de esperanto“ vyzvali jsme čtenáře, aby nám zaslali překlad uveřejněných příkladů. Čtli jsme tím zjistiti jednak, jaký je mezi našimi čtenáři zájem o tuto velmi cennou pomůcku cvičebnou, jednak, jaká je zručnost našich čtenářů v překládání.

Počet účastníků této soutěže (nota bene: o knižní odměny) ukázal nám, že zájem čtenářů o věc rovná se téměř nule, že čtenáři si neuvědomují, jaký význam má právě překládání, jak cenný je to prostředí k sebevzdělávací (překládáním prohlubují se naše znalosti věcné, naše znalost jazykového mechanismu, tedy jazyka vůbec, znalost mateřštiny i esperanta zvláště, jím třibi se naše schopnost myšlenková a vyjadřovací). Pro mnohé čtenáře — pro ty, kdož necestují do ciziny, nedopisují si s cizinci, nemají přístup k espe-

rantským překladům knih nepřeložených do češtiny — je užitek z překládání dokonce jediným užitekem, který oni z esperanta mají. Co ti lidé získávají znalostí esperanta? Nevíme, netušíme, nechápeme. A přece esperanto má cenu jenom pro toho, kdo je prakticky užívá. Aspoň tedy k sebevzdělávání překládáním (rozumí se překládáním pro sebe, nikoli pro veřejnost, pro tisk).

Došlé překlady nám ukázaly, že výcvik v překládání jest u nás velmi malý, že mnozí čtenáři i v případech nejjednodušších, kde význam jednotlivých prvků bezpečně znají nebo si mohou snadno (ve slovníku) zjistiti, často nechápou správně smyslu myšlenky a často pochopenou myšlenku nedovedou správně vyjádřiti. Schází tu zřejmě cvik — také v překládání dlužno se cvičiti. Mnohdy neohrabanost překladatelská u některých čtenářů jest až nepochopitelná (proto ovšem nemusejí se rmoutiti, dobře však udělají, když se budou cvičiti). Namátkou vyjímáme ukázky z došlých překladů:

Zdalo by se, že není možno, aby čtenář nerozuměl jednoduché větičky „Alkalkuli la poŝtajn spozojn“. A přece jeden čtenář místo samozřejmého „Připočísti poŝtovní náklady (výlohy)“ překládá „Připočísti poŝtovní tržbu“. Jiný čtenář překládá: Adiaŭa vorto = loučivé slovo; adiaŭa kunveno = loučivá schůze. Je vidno, že pojmu rozumí, ale v pochybené snaze vyjádřiti se stejným počtem slov jako v esperantu, vyjadřuje se tak, jak se žádny Čech nevyjadřuje, jistě ani sám překladatel; kdyby psal volně, jistě by napsal správně: slovo na rozloučenou, schůze na rozloučenou. Esperantista sice řekne „Averti iun pri io“, ale Čech neříká „varovati někoho o něčem“, nýbrž „před něčím“. „Mi akceptas vian proponon promeni“ snese těžko překlad „Přijímám váš návrh procházeti se“. Říkáme: „návrh, abychom se prošli“ nebo „návrh na procházku“. Říká někdo česky „Využitý šat“ místo „Obnošený šat“? A přece tak jeden čtenář překládá „Eluzita vesto“. Atd. Podobných ukázek bylo by mnoho a čtenář pozná je z poznámek připojených k uveřejněným překladům.

Účast čtenářů na překládání ukázala nám tedy dvojí: počet překladů ukázal, že o věc není zájmu, a že tedy bylo by lépe ve frazeologickém výboru nepokračovati a raději vyhledati jinou věc, která by upoutala zájem větší; jakost překladů však ukázala, že u nás je výcviku v překládání nanejvýše třeba a že bylo by proto dobře více se mu věnovati a tedy ve frazeologickém výboru pokračovati. Co má redakce dělati: pokračovati či nepokračovati? To je otázka, kterou čtenáři rozhodnou účastí nebo neúčastí na překládání.

#### PŘEKLAD 19. TEXTU.

Došlo nás 8 překladů tohoto textu. Účastnili se: Čížková Bučovice, Grodl Rozsochy, Impsal Košice, Ničke Ostroměř, Nyvltová Praha, Štrihavka Kladno, Vondroušek Brno, Görtlerová Praha. Z nejlepších překladů losem vybrán překlad p. uč. Grodla z Rozsoch a odměněn knihou Georgo Dandin

**Ne serĉu en la mondo absoluton!** Ĉio estas relativa: intelekto, sento, volo, libero, bono, malbono kaj la moralo mem. La sopiro al la absoluto radikas<sup>1)</sup> en via animo, tie vi trovos la idealojn, kiujn sekvi estas via vivodevo<sup>2)</sup>. Rigardu ĉion el la vidpunkto de la senfino kaj eterno, sed memoru, ke

en la iomo<sup>3)</sup> da tempo, donita al vi, validas la leĝo de la progreso! La geologio kaj arkeologio instruas nin, ke la vivo sur la tero evoluas de malpli perfekta al la pli perfekta, de la instinkta al la inteligenta, pli senteca kaj pli libera. En tiu direkto serĉu do tion, kio devas esti: tie estas la moralo. Neniam forgesu, ke vi estas parto de la tuto (de la familio, nacio, homaro, universo) kaj ke, kun kresko de la tuto, kreskas ankaŭ vi! La utilo de la tuto estas pli ĉefa ol via utilo! Ne serĉu heroaĵojn, sed plenumu simple vian devon. D-ro A. S. Batěk.

#### 20. TEXT K PŘEKLADU.

**Stromy kvetou.** Široké aleje na stránkách neb kolem silnic rozkvetly květy buď červenými neb bílými. Tajemná vůně, šířící se daleko v okolí, a uchvacující pohled na nádheru květů nám teprve podává plný obraz rozvinutého jara. Jako panenky stojí stromy vedle sebe se svým skvostným hávem. Tak mile a dobře je ti uprostřed nich, že zapomínáš na všechny bolesti dneška, neboť ony tě uchvátily svým jarním kouzlem; kvetou... Vzpomínáš, že i ty jsi se před lety cítil kvetoucím jarem, jarem kypícím a milujícím. Jarem, které seje vůkol jen květy mladosti, síly a lásky. Tak najednou vzpomínky přijdou jako blesk a jdou jedna za druhou, mazlíce se navzájem. Kvetoucí stromy a vzpomínky mládí, toť jeden nedělitelný a krásný celek.

J. T.

#### DIVERSAĴOJ.

**Malfrua eldono** de tiu ĉi kajero estis kaŭzita per troa okupiteco de la redaktantoj okaze de la Paska Konferenco, ĝiaj preparoj kaj ĝia likvido. Ni petas pardonon de niaj abonintoj. La junia numero aperos komence de julio, poste sekvas somera paŭzo, kaj en aŭgusto ni preparos la septembran numeron eldonitan komence de septembro. Laŭ la deziro de la Paska kunveno de ĈAE ni klopodos aperadi en la komenco de la respektiva monato.

\*

Se vi ne pagis ankoraŭ vian abonon por 1927, sendu vian abonon afable tuj post la ricevo de tiu ĉi numero. La tempon kaj monon, kiun ni ŝparos ne bezononte post la 15. Junio dissendadi admonilojn, ni uzos por pli akurata aperado de la gazeto kaj ĝia perfektigo.

\*

**El Internacia Movado,** Kronikon pri ĉs. movado, Tra la gazetaro, kaj aliajn rubrikojn ni publikigos venonte. La kluboj kaj kursestroj, kiuj ĝis nun ne sendis raportojn pri sia agado, kursoj, ĝeneralaj kunvenoj ktp., bv. tion fari ĝis la 20. Junio.

**Gazetara servo.** Samideanoj kunlaborantaj bv. publikigi precipe la informon pri esperanto en la Sudslava fervojoj (vidu 270-an notizon en tiu ĉi n-ro) kaj sendi al ni unu ekz. de la gazeto por Internacia Centra Komitato en Genevo. Laŭ deziro la kostojn ni repagos.

<sup>1)</sup> bazas en... <sup>2)</sup> vivotasko; tasko, devo, misio de via vivo. <sup>3)</sup> ero da...; malmulto da...; nikoli: manetendo...

## BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 19.

MAJO 1927.

## PASKA ĈAE KUNVENO EN PRAHA.

Prezidis S-ro *Eiselt*, protokolis S-ro *Dobeš*. S-ro *Hromada* laŭtlegas la programon de la kunveno publikigitan en la lasta Bulteno. — S-ro *Neužil* salutas en la nomo de la instruistoj.

S-ro *Echtner* dezirus, ke la nombro de la membroj de ĈAE atingu en 1927 la ciferon 1000. La kotizon 16 Kĉ jare ĉiu akiros ŝparante en amuzo, fumado, ktp. Plie, oni laboras en multaj fakoj, sed oni laboru en unu kaj kun plena energio, nur tiam oni sukcesos.

D-ro *Parma*: Jarkotizo 16 Kĉ ne estas multe. — Ni propagandas per gazetartikoloj. Sed ne ĉiuj artikoloj disponigataj en *La Progreso* estas de niaj membroj represigataj. Li rekomendas eldoni libreton, kiu enhavus propagandan materialon, laŭ kiu oni povus verki artikolojn pri esp. por ĉeĥaj gazetoj.

D-ro *Kamaryt* ankaŭ bedaŭras, ke la gazetserva materialo de *La Progreso* ne estas uzata pli multe. Laŭ la nombro de artikoloj publikigitaj pri esp. de neesperantistaj gazetoj ĉeĥaj ni estas sur bona loko, sole Hungaroj superas nin. Statistiko de ICK pri tio estas nekompleta.

S-ro *Neužil*: En Olomouc ni volas propagandi en kinematografoj. Li demandas, ĉu ĈAE havigus diapozitivajn por tio.

S-ro *Echtner*: En la komitato de ĈAE oni parolos pri tio.

S-ro *Waldstein* subtenas la ideon de D-ro *Parma* pri libreto kun propaganda materialo.

S-ro *Echtner*: Tia libreto baldaŭ malnoviĝas kaj estus multekosta. Bindigu vian *Progreson* kaj tiel vi konservos la materialon. Ankaŭ *Esperantský Zpravodaj* de F-ino *Šupichová* enhavas multe da propaganda materialo.

D-ro *Parma* pliprecizigas sian ideon dirante, ke la libreto enhavu kompletan materialon por diversaj temoj, ekz. Blinduloj kaj esp., radio kaj esp. k. s.

S-ro *Kudela* opinias, ke la gazeta propagando estas pli bona ol la kinematografia. Atentigas pri la bonega *Nový Lid*.

S-ro *Neužil* revenas al la ideo de la kino-propagando.

S-ro *Brambora*: Praha-klubo ankaŭ propagandis en kinoj. Enketinte inter la kursanoj, ni trovis, ke neniu el ili estis varbita per kino.

D-ro *Kamaryt*: En Bratislava, dum 1924, estis 240 kursanoj. En 1925, post kino-propagando, 102.

S-ro . . (nomo ne aŭdita): Plej bona estus enkonduki esperanton en la lernejojn. Maturaj homoj estas malfacile varbeblaj kaj ne ŝatas lerni.

S-ino *Grossmannová* (Bohdaneč) deziras, ke la aktualajn gazetinformojn la Asocio dissendadu senpere al la redakcioj.

S-ro *Eiselt* foriras. Prezidos D-ro *Parma*.

S-ro *Fryml* (Karlín) rekomendas uzi ĉiujn rimedojn por varbi inter la junularo.

S-ro *Neužil*: Kvar lernejoj inspektoroj en Moravio estas favoraj al esperanto. Li proponas alvokon, ke ili rekomendu lernadon de esp-o.

Alvenas S-ro *Jakob*, direktoro de UEA.

S-ro *Jakob*: Ni ne laciĝu varbante por UEA. Se tiu ĉi travivas malfacilajn jarojn, ni memoru, ke eĉ grandaj internaciaj societoj, ekz. Ruĝa Kruco, havas deficitojn. La senpera membreco kiun Ruĝa Kruco volis enkonduki en Svislando malsukcesis.

S-ro *Hromada*: ĈAE ŝatas ricevadi proponojn kaj konsilojn de sia membraro. Sed ni insistas, ke laboron unufoje interkonsentitan oni efektive ankaŭ ĉiuforte plenumu. Gazetara servo montras belajn rezultatojn, sed povus esti pli kompleta. Pluajn kunlaborantojn ni invitas. Li plendas ankaŭ, ke diversaj alvokoj en *La Progreso* kaj Bulteno ne estas sekvataj. Li dankas al tiuj, kiuj sekvas ilin kaj, ekz. multon faris por esperanto en Praha-radio. — Li mencias, ke ĝis nun, ekz., iuj el samideanoj elektitaj por Komitato kaj Kontrola Komisiono de ĈAE ne respondis demandon, ĉu ili akceptas la funkcion, kvankam preta formulo estis almetita.

D-ro *Parma*: Kiu lernas esperanton, volas ĝin uzi por rilatoj kun alilingvanoj. Li rekomendas aranĝi reciprokajn kunvenojn aŭ vizitojn de diverslingvaj esp-istoj, laŭ ekzemplo de Silezio en Ostrava regiono.

S-ro *Kudela*: En Olomouc ni kunigis ĉiujn kotizon kaj poparte ilin enkasigas. Por varbi membrojn, mi antaŭe pagas iliajn kotizojn kaj poste enkasigas ilin de la membroj. — Li deziras, ke *La Progreso* aperadu regule; se la nuna redaktoro estas tro okupita, li aprenu kunlaborantojn.

S-ro *Hromada*: Multaj malnovaj samideanoj ne estas organizitaj en ĈAE. Ĝuste esperantistoj el la malnovaj kluboj Plzeň, České Budějovice kaj Brno mankas en ĈAE.

Pri *La Progreso*, li volas atentigi, ke fakte la plendo pri la apero estas la sola, kiu aŭdiĝas. Pri la enhavo la legantaro verŝajne estas do kontenta. Tamen li dezirus, ke estu pli vigla rilato inter la abonantaro kaj la redakcio. Ni ne havas multe da bonaj tradukantoj. *Progreso* volas helpi en tiu rilato per siaj tradukaj tekstoj kaj lingva fako. Sed sole nemultaj partoprenas en la tradukado. Neniu lingvaj demandoj venas. Tamen el la korespondado kaj ricevataj manuskriptoj la redakcio vidas, ke pli funda kono de la lingvo ĉe multaj estas dezirinda. — Ni klopodos aperadi denove regule, kiel ni faris post la 1bertempo de la pasinta jaro — Kunlaborado de ĉiu estas ĉiam volonte akceptata.

La kunveno estis finita je 11:45 horo.

Zdeněk Dobeš.



## Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

### 270. Jihoslovanské dráhy zavádějí esperanto.

Veškeré nápisy v železničních vagoncích jihoslovanských budou podle nového výnosu ministerstva železnic v Bělehradě uvedeny v domácích jazycích a v esperantu. Ministerstvo uznalo, že esperanto plně nahradí dosavadní mnohojazyčné texty ve vagoncích.

271. Esperanto ve švédské sněmovně. Štokholmský starosta Lindhagen měl řeč ve švédském parlamentě, v které žádal vládu, aby působila u Svazu národů ve prospěch esperanta. Uvedl, že esperanto nutno zavést co nejdříve do obecných škol, aby se všechny vrstvy mohly účastnit přímo na kulturním životě národů. Malé národy jsou nespravedlivě utlačovány nadvládou několika tak zvaných světových jazyků. Pomocí může jen esperanto, jež se osvědčuje již po desetiletí.

272. Japonské prohlášení proti evropským jazykům a pro esperanto. Výbor III. vědecké konference tichomořských zemí konané v Tokiu prohlásil předem, že jediným jednacím jazykem této konference jest angličtina a že nebude připuštěna francina, němčina nebo esperanto. Četní japonští učenci se z tohoto důvodu schůze nezúčastnili, 18 z nich pak vydalo písemný protest, v němž praví: Při mezinárodní konferenci pořádané v Japonsku, pro jehož obyvatelstvo jest učení evropským jazykům velkým břemenem, musí býti užíváno vždy mezinárodního jazyka esperanto, jenž jest snadno naučitelný pro příslušníky všech národů.

273. Esperanto společným jazykem aviatiků. Mezinárodní letecká liga zřídila ve svém sídle v Paříži, Clos Normand, kurs esperanta. Členové ligy jsou vyučováni bezplatně dvakrát týdně tomuto jazyku a dostávají esperantský měsíčník. Předseda ligy slavný americký aviatik Clifford B. Harmon, na jehož popud bylo vyučování zahájeno, se sám rovněž učí esperantu, jehož znalost považuje za nutnou pro letce celého světa.

274. Esperanto u pařížské policie. V pařížském policejním ředitelství, kam přichází denně spousta cizinců všech možných národů a kde bylo vždy mnoho nesnází s dorozumíváním, učili se někteří úředníci cizím jazykům. Brzy však seznali, že nemohou vyhovět všem. Jelikož se při tom stále množily případy, že cizinci hovořili esperantsky, obrátilo ředitelství svůj zřetel i na tento jazyk. Esperantský tlumočník jest nyní velmi často vyhledáván a poučení o průkazech pro cizince bylo vyvěšeno jen ve dvou jazycích, francouzsky a esperantsky.

275. Esperantská literatura technická. Radiojournal, týdeník československé vysílací společnosti, oiskuje již po několik měsíců populárně psané články o základech radia. Jsou to překlady původní práce esperantské, uveřejněné v mezinárodním časopisu Internacia Radio-Revuo.

276. Esperantský rozhlas z dalších stanic. Malé evropské národy následují v úpravě radiových programů pro zahraničí příkladu velkých států a

esperanto se stává pravidelnou položkou jejich rozhlasů. V poslední době využívají též Litevci možnosti, které skýtá rozhlas a esperanto k obeznámení ciziny o svých zájmech. Radiostanice v Kovně vysílá každou středu v 6 hodin na vlně 2000 m esperantské přednášky o litevských událostech. V stejnou hodinu vždy v pátek jest vysílán touto stanicí litevský kurs esperanta. Litevský svaz esperantský Litova Esperanto-Asocio, Rotušes a. 6, Kaunas prosí amatéry, kteří zachytili jmenovaný rozhlas, o zprávu.

277. Zamenhofova ulice v Československu. V cizině jsou již v různých místech pojmenovány ulice po Zamenhofovi. V Československu připomíná autora esperanta Zamenhofova ulice v Nových Zámčích, nedávno tak pojmenovaná usnesením městské rady a pak stejně zvaná ulice v Drahovicích u Karlových Varů.

278. Esperantský těsnopis. Esperantských těsnopisů bylo utvořeno již několik a skoro všemi z nich jest s úspěchem psáno v různých zemích. V této věci není dosud zachována zásada mezinárodnosti, ač bylo učiněno již několik pokusů v tomto směru. Dosavadní všeobecný vývoj nesměňuje k tomu, aby byl utvořen jednotný esperantský těsnopis k užívání v celém světě, nýbrž jsou v jednotlivých zemích pro esperanto přizpůsobovány systémy, jež jsou tam užívány pro domácí jazyk. Gabelsborgův těsnopis jest přizpůsoben na několik způsobů k stenografování esperanta. V Německu byl nově upraven pro esperanto systém Stolze-Schrey a rovněž nový jednotný německý těsnopis „Reichskurzschriift“. Skola Arends, jež má mnoho příznivců zejména mezi německým dělnictvem, se rozhodla rovněž vydati učebnici tohoto těsnopisu, upraveného pro mezinárodní jazyk Výborné a mnoho užívané, pro nás však nezvyklé, jsou esperantské těsnopisy podle francouzského systému Duployé a anglického Pittman.

279. Esperanto v Persii. Počet Peršanů znajících esperanto se v posledních letech značně rozmnožil. Tamní pracovníci pro esperanto, kteří již v dobách předválečných upozorňovali perskou veřejnost na potřebu mezinárodního jazyka a dosáhli tehdy pěkných úspěchů, zahájili nyní úsilivnou činnost, aby bylo co nejhojněji užíváno esperanta všude, kde jde o styk se zahraničím. K dřívějším dvěma výborným perským učebnicím esperanta bude vydán nyní ještě perský „Klíč esperanta“ určený k hromadnému rozšíření po celé zemi. Jest to malá brožura vážící jen 10 gramů, obsahující však úplnou mluvnici tohoto jazyka se slovníkem, který zcela postačí pro denní styk a obchodní život. Organisoaná propaganda se bude dít za podpory Světového svazu esperantského, jenž má zástupce v perských městech Teheranu, Tabrizu, Ispahanu, Sultanabadu, Rechtu a v Kermandži.

280. Syrští studenti pro esperanto. Mezi syrskými posluchači vysokých škol jest živý zájem pro esperanto. Velký počet jazyků užívaných při vyučování působí jim nesenáze často naprosto nepřekonatelné. V Beirutu zřídila americká universita kursy, v nichž arabští, perští a arménští učitelé vyučují žáky těchto národností esperantu.

**Pro kursy opatříme Vám:****Učebnice:**

- Dr. Šilha: Učebnice esperanta. Schválena ministerstvem školství . . . . . Kč 10·60  
 při větším množství slevy  
 H. K. Bouška: Škola esperanta . . . . . Kč 31—  
 J. Šupichová: Učebnice esperanta . . . . . Kč 10 20  
 Žďárský-Procházka: Učebnice . . . . . Kč 21—  
 J. Bednář: Esperanto . . . . . Kč 13—

**Slovníky:**

- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. váz. Kč 25—  
 Čánský-Riedl: Slovník esper.-čes. . . . . Kč 21—  
 Hromada-Petr: Slovník esper.-český . . . . . Kč 6 80  
 Čánský-Riedl: Frazeologický slovník . . . . . Kč 5·50

\*

- Šupichová: Kniha konversace . . . . . Kč 10·20  
 „ : Legu kaj parolu . . . . . Kč 16 80  
 Fundamenta Krestomatio . . . . . Kč 21—  
 K. Čapek: RUR . . . . . Kč 16·40  
 Biblioteko Mosse 10 čísel . . . . . Kč 32—  
 Biblioteko Hirt, svazek po . . . . . Kč 14—

**Ke zkouškám z esperanta:**

- Zkušební řád Svazu . . . . . Kč 2·20  
 Bachtík: Speciální zkoušky . . . . . Kč 2·20  
 Möbusz: Dokumentoj de esperanto . . . . . Kč 21—  
 Ladeveze: Demandaro . . . . . Kč 10·60  
 Cart: Klasika libro de esperanto . . . . . Kč 5·40  
 Kabe: Enciklopedia vortaro, váz. . . . . Kč 18—  
 Kamaryt: Jazyk mezinárodní . . . . . Kč 8·80  
 Kotzin: Na obranu esperanta . . . . . Kč 3 40  
 Collinson: Esperanto a jeho kritikové . . . . . Kč 2·40

Obstaráme za předem zasl. obnos. Žádejte složenku.

Při placení pošt. poukázkou přidejte 50 hal.  
 V cenách je porto obsaženo.

**La Progreso, Praha-VII., Sochařská, 333.**

**Krátký kurs esperanta** vydalo Progreso. Na 4 str. obsažen jest přehled mluvnice, přehled tvorby slov. Úvod vzorně vysvětluje základní zásady struktury esperanta. Za 50 hal., 10 výt. 5 Kč, 100 výt. 40 Kč.

**Esperanto a jeho kritikové!** Napsal W. E. Collinson, prof. university v Liverpoolu. Stran 24, cena Kč 2·40 (s portem). — Doporučujeme všem, kdož se chtějí hlouběji seznámiti s vědeckým odůvodněním jazykových zásad esperantských

Baldaŭ aperos!

**KOMERCA VORTARO EN ESPERANTO**

de

Robert Kreuz &amp; A. Mazzolini

membroj de Lingva Komitato.

Aranĝita laŭ metodo de Kabe. Cca 120 p.

Prezo bindite Kč 20.

Havebla pere de La Progreso.

Aby dostižen byl počet

# 1000

členů našeho propagačního střediska

SVAZU ČS. ESPERANTISTŮ,

jest nezbytně potřebi,

aby každý čtenář Progresu se stal

členem Svazu.

—\*—

Roční příspěvek 16 Kč. Knižní premie.

Příhlášky a informace:

SVAZ ČS. ESPERANTISTŮ PRAHA-VII.

SOCHAŘSKÁ 333/1.

**Legu en kursoj:**

Dro Privat:

**Historio de Esperanto**

74 p. Kč 15—

**Vivo de Zamenhof**

109 p. Kč 20—

Novinová sazba povolena Ředitelstvem pošt a telegrafů v Praze č. 238.888/VI-23.  
 Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. — Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.

